

UKRAINIO, kies enloĝantoj konsekvence estas UKRAINOJ. Simile ni modifis la internacilingvan formon GAGAŬZO forstrekante la hokon super U kaj tiel proksimigante la prononcon al la etnalingva.

- * GAELO estas malpreciza, tial utilas diferencigi inter la du branĉoj dirante SKOT-GAELO kaj IRLAND-GAELO.
- * LUKSEMBURG(I)O: Kiam temas pri la propra lingvo de tiu ĉi ŝtato, oni nun preferas nomi ĝin LECEBURGA lingvo.
- * Cetere, numero 4 de *Etnismo* estas la "naskiĝ-dokumento" de la termino PLATDIĈA.
- * Kelkaj internacilingvaj formoj de geografiaj nomoj estas precizigitaj, ekzemple, ŜLESVIGIO-HOLSTINIO anstataŭ ŜLESVIGO-HOLSTINIO, por diferencigi la nomon de la regiono disde tiu de ĝia ĉefa urbo.
- * Anstataŭ "KOMUNUMO" en la senco de plej malsupra organiza kaj sin administranta unuo de la socio mi uzas jam delonge "MUNICIPO".
- * Miaj skribmaŝinoj ne disponis pri la supersignoj ĉefe uzataj en slavaj lingvoj, ekzemple ĉ - ŝ - ŝ - ž - ktp., kiuj nuntempe ja kutimas en komputoroj.

ENHAVO

Evidente, tia informilo aŭ bulteno aŭ revuo estas ege limigita el pluraj vidpunktoj, interalie el tiu de diverseco de temoj kaj el tiu de enhava originaleco. Mi klopodis kompensi, ĝis certa grado, tiurilatajn mankojn per rektaĵaj informoj.

- * Tre utila kaj internacilingve relative facile uzebla rimedo estas la rekta informado far surlokuloj aŭ specialistoj. Tiumanieraj kontribuintoj aŭ tradukintoj estas Pavel Apovnik (aŭstriaĵ slovenoj), Hilary Chapman (kimroj, kornŭekoj), Renato Corsetti (kurdoj), Rudolf Grulich (rutenoj, gagauzoj), Erik v. Herten (sameoj, svedoj en Suomio), Wim Jansen (piemontanoj, frisoj), William McCallum (skotgaeloj), Louis Pelletier (okcitanoj), Adrian Pilgrim (manksoj), Carl Støp-Bowitz (norvegaj lingvoj), Renée Triolle (alzacanoj), Dirk Willkommen (feroanoj).
- * Plurfoje, en diversaj numeroj, estas retroveblaj dokumentoj kiel, ekzemple, tiu rezolucio, pri la situacio de etnoj, kies lingvoj kaj kulturoj estas minacataj, de la Internacia Esperanto-Kongreso en Antverpeno de la 1-a de majo 1972 (n-ro 1, paĝo 4) aŭ tiuj du pri "La kataluna en la lernejoj" kaj "Kontraŭ la subpremo de Katalunio" (n-ro 2, paĝoj 4 kaj 5) aŭ la statuto de la Asocio Internacia por la Defendo de Minacataj Lingvoj kaj Kulturoj (n-ro 2, paĝoj 11 kaj 12) aŭ la prediko de la episkopo Añoveros, de Bilbo pri "La kristanismo - savomesaĝo por la popoloj" (n-ro 6, paĝoj 10 - 12) ktp.
- * Alia rekta informado okazis en aro da *Etnismo*-numeroj: intervjuado de iel koncerntaj personoj kiel, ekzemple, Ramon Aramon i Serra de "Institut d' Estudis Catalans" (n-ro 2, paĝoj 8 kaj 10) aŭ Heng Rinnen de "Institut Grand-Ducal" de Luksemburgio aŭ s-ro Sikkema de la Frisa Akademio (n-ro 4, paĝoj 3 kaj 4) aŭ Luis Villasante, la tiutempa prezidanto de la Akademio por la